

## Solvoj

### Praktiko 5.1 “Kion oni volas?”

Se io plaĉas al iu, tiu volas fari tion. Ŝanĝu la frazojn: diru, kion oni volas aŭ ne volas. Ekzemple:

Plaĉas al Georgo suko. (trinki)

→ Georgo volas trinki sukon.

1. Plaĉas al Georgo kongresoj. (iri)  
**Georgo volas iri al kongresoj.**
2. Plaĉas al Ruselo Helena. (vidi)  
**Ruselo volas vidi Helenan.**
3. Plaĉas al Karlo pilkoj. (ĵongli)  
**Karlo volas ĵongli pilkojn.**
4. Malplaĉas al Flora drogaĉoj. (uzi)  
**Flora ne volas uzi drogaĉojn.**
5. Malplaĉas al la detektivo Ruselo. (aresti)  
**La detektivo volas aresti Ruselon.**
6. Intervjuo kun Flora plaĉas al Ken. (intervjui)  
**Ken volas intervjui Florian.**
7. Malplaĉas viando al Flora kaj Karlo. (manĝi)  
**Flora kaj Karlo ne volas manĝi viandon.**
8. Plaĉas al Filisa akvo. (trinki)  
**Filisa volas trinki akvon.**
9. Malplaĉas al Ruselo prizono. (iri)  
**Ruselo ne volas iri al prizono.**

### Praktiko 5.2: Elektu unu el tri

1. La detektivo volas (saluti / **aresti** / promesi) la ŝafiston.
2. La doktoro devas (ami / **kuraci** / ŝoki) Karlon.
3. Flora (amas / **abomenas** / manĝas) viandon.
4. Georgo kaj Filisa volas (**paroli** / kredi / aŭskulti) kun Flora.
5. Ken devas (ŝteli / trovi / **aĉeti**) novajn pilojn.
6. Karlo volis (montri / **kaŝi** / malfermi) la pakaĵon de Jolanda.
7. Flora ne povas (**vivi** / sveni / ŝviti) sen butiko.
8. Karlo volas (instrui / surprizi / **montri**) al la doktoro kiel ĵongli.

### Praktiko 5.3: Kion ili devas fari?

Ligu demandojn 1 ĝis 11 kun la respondoj A ĝis H.

1. Atletoj devas... **bone manĝi. (Ĉ)**
2. Detektivoj devas... **serĉi malbonulojn (E)**
3. Intervjuistoj devas... **lerte demandi. (H)**
4. Butikistoj devas... **vendi varojn sukcese. (F)**
5. Filozofoj devas... **pensi saĝe. (D)**
6. Juĝistoj devas... **decidi saĝe. (G)**
7. Doktoroj devas... **kuraci homojn. (Ĝ)**
8. Ŝafoj devas... **manĝi herbon. (A)**
9. Ŝafistoj devas... **kalkuli ŝafojn. (C)**
10. Lernantoj de Esperanto devas... **paroli kuraĝe kaj diligente studi! (B)**

**A:** ...manĝi herbon.

**B:** ...paroli kuraĝe kaj diligente studi!

**C:** ...kalkuli ŝafojn.

**Ĉ:** ...bone manĝi.

**D:** ...pensi saĝe.

**E:** ...serĉi malbonulojn.

**F:** ...vendi varojn sukcese.

**G:** ...decidi saĝe.

**Ĝ:** ...kuraci homojn.

**H:** ...lerte demandi.

**Praktiko 5.4:**

Ligu demandojn 1 ĝis 9 kun la respondoj A ĝis G.

1. Kial Flora estis kompatinda? **(E)**
2. Kial Georgo estas kompatinda? **(F)**
3. Kial Ruselo estas kompatinda? **(D)**
4. Kial Filisa estas kompatinda? **(B)**
5. Kial Flora ŝoforas senpermeso? **(Ĉ)**
6. Kial Georgo prenis monon el la te-kruĉo? **(G)**
7. Kial la detektivo venis? **(A)**
8. Kial Kenĝi portis glason? **(C)**

- A:** Ĉar Karlo telefonis al la polico.  
**B:** Ĉar ŝia edzo ne rekonas ŝin.  
**C:** Ĉar sinjorino ne trinkas el botelo.  
**Ĉ:** Ĉar ŝi ne havas monon por permesilo.  
**D:** Ĉar la detektivo serĉas lin.  
**E:** Ĉar ŝi havis multajn fakturojn.  
**F:** Ĉar li sen-scie trinkis botelon da vodko.  
**G:** Por doni ĝin al s-ino Bundo.

**Praktiko 5.5:**

Aldonu la ĝustajn sufiksojn:

**-ind, -ebl, -iĝ, -ej, -ul, -aĉ, -ist**

1. Georgo drinkis botelon da vodko kaj li ebri **iĝ**is.
2. Jes, kompren **ebl**e mi povas aŭdi vin; mi ne estas surd **ul**o!
3. “Mi vidas en mia juĝ **ej**o tiujn, kiuj uzas drog **aĉ**ojn.”
4. Ho, via kapo doloras vin? Kompat **ind**a Georgo!
5. Kion vi diras? “Du kaj du estas kvin?” Ne **ebl**e!
6. Alia vorto por doktoro estas kurac **ist**o.
7. Doktoroj laboras en malsan **(ul)ej**oj.
8. Valoras savi la vendejon. La vendejo estas sav **ind**a.
9. Ni povas savi la vendejon. La vendejo estas sav **ebl**a.
10. La vetero estas malbona. Ĝi **aĉ**as.
11. La detektivo ne povas literumi simplajn nomojn. Li estas stult **ul**o.

**Praktiko 5.6:** Elektu la ĝustajn tabelvortojn. (*iu, kiu, ĉiu, neniu, kiel, tiel, kie, tie, ĉie, kial, kiam, kioma, kio, kion*)

1. “Ĉu vi estas surdaj? **\_\_lu\_\_** sonoras ĉe la pordo, sed **\_\_neniu\_\_** iras kaj malfermas ĝin!”
2. “Mia stomako graŭlas **\_\_kiel\_\_** vulkano.”
3. “Ho, **\_\_kie\_\_** estas mia pakaĵo? Ha, **\_\_tie\_\_** ĝi estas!”
4. “Tiu virino kisas min! **\_\_Kial\_\_** ŝi kisas min? Mi ne scias.”
5. “Sinjorino! **\_\_Kion\_\_** vi faraĉas? Ne batu la ŝafiston!”
6. “Kaj nun li ne scias, **\_\_kiu\_\_** li estas, **\_\_kie\_\_** li estas aŭ **\_\_kio\_\_** li estas.”
7. “**\_\_Kioma\_\_** horo estas? Jam la dekunua tridek kvin?”
8. “Mia edzo ne scias, **\_\_kiu\_\_** li estas. Mia filo ne scias, **\_\_kion\_\_** li portas. **\_\_Kie\_\_** mi estas? En idiotejo?”
9. “Mi surmetos la okulvitrojn kaj **\_\_neniu\_\_** scios, **\_\_kiu\_\_** mi estas.”
10. “Sinjorino Flora, mi serĉis vin **\_\_ĉie\_\_**, en la parko, en la urbo. **\_\_Kiam\_\_** vi forkuris, mi kuris post vi.”
11. “Jolanda, Karlo, Helena, Filisa! **\_\_Ĉiu\_\_** estas hejme! **\_\_Kial\_\_** vi ne laboras? **\_\_Neniu\_\_** estas en informejo!”
12. “Ho, stomako, ne **\_\_tiel\_\_** grumblu!”

**Praktiko 5.7: Trankviliĝu!** (Faru vortojn kun la sufikso -iĝ):

1. Flora ne estas *trankvila*. “**\_\_Trankviliĝu\_\_**!” kriis Ken.
2. Georgo drinkis vodkon. Nun li estas *ebria*. Li **\_\_ebriiĝis\_\_**.
3. La glaso ne estas *plena*. Filisa verŝas akvon. La glaso **\_\_pleniĝas\_\_**.
4. Karlo komence kuris malrapide. Nun li kuras *rapide*. Li **\_\_rapidiĝis\_\_**.
5. Komence, Georgo ne estis *laca*. Nun li estas *laca*. Li **\_\_laciĝis\_\_**.
6. Georgo *rompis* la vazon de Flora. Ŝia vazo **\_\_rompiĝis\_\_**.
7. Helena ne estas *fama* skulptisto. Sed eble ŝi **\_\_famigiĝis\_\_**.
8. Ruselo estas *malsata*. Se li multe manĝos, li **\_\_satiĝos\_\_**.
9. Georgo estis sana. Nun li estas *malsana*. Li **\_\_malsaniĝis\_\_**.
10. Oni *interrompis* la intervjuon. La intervjuo **\_\_interrompiĝis\_\_**.
11. La instruisto *komencos* la lecionon je la 7-a horo. Tiam la leciono **\_\_komenciĝos\_\_**.